

'La Krokodil

Informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo
1 place des Avions, 31400 Toulouse
tel/fax 05 61 25 55 77 courriel : esperanto.toulouse@free.fr
<http://esperanto.toulouse.free.fr/>

N° 32 - aprilo 2005

Enhavo	p.
Kalendaro	1
Kroata teatro en Tuluzo	1
Babili: Manĝo-Klaĉo	2
Le Bâton à Palabre	2
Mon Caf	2
Semajnfino en Villefranche	2
Semajnfino en Arrout	2
Biblioteko	3
Projet : Qui sommes-nous ?	3
Projet : Sub-titoloj	4
Okazis: Les 100 ans de l'association toulousaine	4
Le Manĝo-Klaĉo	4
Changement d'adresse	4
Week-end à Arrout	5
Kaj en aliaj regionoj	6
Point de vue : Traité Const.	7
Cours et stages d'été	9
Aliaj vojaĝoj...	9

Kalendaro

Majo

- Mar 03 Début du Cours Express (CIDES)
Ven 06 20.00. Manĝo Klaĉo (M. de Quartier Ranguel)
07- 08 Week-end Catalan – Villefranche de Conflent (66)
Lun 09 Journée de l'Europe (stand)
Ĵaŭ 12 Debato en Bâton à Palabre, 15 r. de Thionville
Sab 21 Festa d'Òc en Castanet-Tolosan
Mar 24 Mon Caf (Capitole placo) – Babilado
28.29 Prima de las Lengas (Capitole-placo)

Junio

- Ven 03 Manĝo-Klaĉo (loko fiksota)
4.5 Semajnfino en Arrout/Week-end à Arrout
19-24 Festival Théâtre d'Enfants (FITE) (dates
changées)

Okazos / Ne mistrafu



Kroata teatro en Tuluzo

Kadre de la Internacia Infan-Teatra Festivalo (IITF) (Festival International de Théâtre d'Enfants FITE), du junulaj trupoj de Zagreb (Kroatio) estas selektitaj.

Ili venas de elementa lernejo Mladost kaj estas gvidataj de esperantistinoj Marija JERKOVIC

kaj S-ino STEPINAC. La infangrupo, kiu konsistas el 10- ĝis 13-jaruloj, ludos teatraĵon en esperanto. La junulara grupo (14-20-jaraj) ludos en franca lingvo, kaj estos akompanataj de instruistino pri la franca, kiu ankaŭ estas esperantistino.

Gastigi kroatan infanon

La festivalo-organizanto trovis gastfamiliojn por la junaj kroataj aktoroj, en vilaĝo apud Tuluzo, sed ne por ĉiuj : EKC estas petita trovi gastfamilion por du infanoj (aĝo 10-13), kaj eble por unu akompanantino. Gastfamilio provizas manĝojn al la infanoj (krom kelkaj lunĉoj kiuj

estos donitaj de la Festivalo), kaj sindevigas akompani ilin ĉiutage al la teatro Daniel Sorano (Allée Jules Guesdes), aŭ en rendevuloko precizigota, en du aliaj lokoj de Tuluzo.

Interesitaj familioj rapide kontaktu nin. Dankon.

Babili en Esperantujo...

Manĝo-Klaĉo – 6 majo

Vendrede, 6-an de majo, okazos Manĝo-Klaĉo en Maison de Quartier Rangueil, kie troviĝas nia biblioteko (vidu sube).

Ne mistrafu tiun okazon informiĝi pri la lastaj novaĵoj tuluzaj aŭ internaciaj, la lastan furoran diskon aŭ libron... kaj kompreneble klaĉi pri la neĉeestantoj !

Kiel kutime, kunportu manĝaĵon kaj trinkaĵon, kaj ankaŭ manĝilaron.



Ĵaŭdon, 12-an de majo (ekde la 20.00) 15 rue de Thionville

Temoj : niaj hobiaj, kaj skrabloludo en dua parto (kun iloj adaptitaj al esperanto).

En Mon Caf' (Capitole-placo)

24-an de majo

Tiu iniciato de germanaj tuluzanoj daŭras, ĉiun monaton, oni parolas diversajn lingvojn en kafejo Mon Caf', je la horo de aperitivo, de la 19.00 ĝis proksimume la 20.30.

La unuan fojon (25-an de januaro), ĉeestis multaj esperantistoj, kiuj devis kunigi plurajn tablojn por kuni. La duan fojon, en marto, ĉeestis nur tri esp-istoj, kiuj havis agrablan babilan tempon.

La venonta babilado okazos mardon la 24-an de majo. Ĝi estos la lasta de la sezono, do venu multenombre por amuziĝi, klaĉi, kaj montri esperanton.

Semajnfino en Villefranche de Conflent (66) – 7-8 majo

Temas pri amika renkontiĝo, de sabato 10.30 ĝis dimanĉo 17.00.

Prezo por la du tagoj : 39 €, tridek naŭ eŭroj.
Eblas veni aŭte, trajne, buse. Nur 30 lokoj, la interesatoj aliĝu rapide !

La programo: luda kurso, ludoj, kantoj, piedirado, vizito de la kastelo...

kristian.pinard@wanadoo.fr

Semajnfino en Arrou (Ariège) 4–5 junio



10 heures de cours, deux niveaux. Du samedi 10.00 au dimanche 17.00. Au moins deux heures réservées aux ballades (en fonction du temps).

Hébergement en chambres de 3 ou 6 lits, 2 repas et 1 petit-déjeuner fournis (prévoir pique-nique samedi midi).

PAF : - adhérents : 28 € - non-adhérent : 44 € . ou 36 €

Biblioteko

Erratum :

La permanence de la bibliothèque est bien le **lundi** (et non le jeudi comme indiqué par erreur dans le précédent Krokodilo) de 16.00 à 19.00 à la Maison de Quartier Rangueil, 19 rue Claude Forbin, 31400 Toulouse (salle des associations).

Venez y consulter les **revues** du mois (une dizaine de titres), emprunter quelques livres, écouter de la **musique**, afin de choisir votre prochain disque, ou même vous renseigner sur **l'actualité** du monde de l'espéranto (voyages, recontres, etc...)

Faites-le savoir autour de vous.

PROJETS :

Qui sommes-nous?

Voici un petit questionnaire réservé aux membres de l'association et destiné à mieux nous connaître les uns les autres. Il n'a aucun caractère obligatoire. Mais il serait dommage que vous ne le remplissiez pas. En effet, les vétérans ne sont pas forcément connus des bleus. Et puis on peut avoir besoin des compétences professionnelles ou non de quelqu'un d'autre, d'un service, d'un renseignement. Cela ne serait-il pas

sympathique de faire plus de choses ensemble ?

Alors pourquoi ne pas compter sur nos propres forces et ainsi apprendre à nous connaître ? A notre avis, cela contribuerait à renforcer l'association. Il nous est apparu plus opportun qu'il soit rédigé en français étant donné les différents niveaux de connaissance de l'espéranto. Vos réponses seront publiées dans le *Krokodil*'.

— Gérard IMHOFF

prénom	
nom	
adresse	
téléphone	
email	
membre depuis	
profession	
compétences	
loisirs	
centres d'intérêts	
avez-vous des suggestions ou des idées?	

Sous-titrage en espéranto

Les diffuseurs d'un film canadien, militant féministe et critique envers l'économie, ont demandé à EKC de participer à la traduction des sous-titres de *Qui compte ? (Who's Counting?)* en espéranto.

Qui est intéressé par ce travail, que l'on peut imaginer faire en commun ? Une partie sera faite par Jany & Jorgos, l'autre moitié par nous. (Contacter Jeannette)

Okazis / Vous avez fait

Les cent ans de l'association d'espéranto de Toulouse

Notre *Repas-Tchatche* de mars était particulier, parce que les espérantistes toulousains se sont réunis pour commémorer le centenaire du premier groupe espérantiste de Toulouse, fondé le 5 mars 1905. Nous avons fêté cela au local des *Cheminots Toulousains pour l'Espéranto*, qui a failli être

trop petit pour les 27 fêtards. Comme d'habitude, chaque convive a apporté à manger et à boire pour partager entre tous. Notre historien de service, Christian Lavarenne, a fait une petite conférence sur ce premier groupe

— Rikardo

Manĝo-Klaĉo (aprila)

La unua de aprilo estis la manĝo-klaĉa tago.

Oni kuniĝis ĉe la familio Katerina kaj Bernardo Martinez, kiuj loĝas en Labarthe/Lèze je dudek kilometroj de Tuluzo.

En bona, agrabla, inteligenta etoso, ĉeestis dek du gebonvenuloj, kiuj kun si alportis malsamajn bongustajn pladojn kaj ankaŭ bonajn botelojn da vino.

La vespero komenciĝis per aperitivo.

Gespertuloj kaj novaj gelnantoj miksiĝis por babiladi iom esperante, iom france, sed ĉiuj en bona humoro.

La temo de la vespero estis pri la kongreso de Bulonjo-ĉe-Mar, kaj aliaj aferoj

EKC prezentis la lastan bildstrian tradukaĵon de Tinĉjo en Tibeto, kaj ankaŭ Pasportan Servon 2005

Tiu vespero similis al la teatraĵo *Familia etoso*, sed pli agrable....

Post kiam ni reŝanĝis la mondon en la parolado, la vespero finiĝis en bona etoso.

Atendante la venontan gaŭlan manĝon, ni foriris en niajn hejmojn por ripozi de tiu bela vespero.

— Bernardo

Changement d'adresse de l'association :

Depuis février 2005, le siège social du Centre Culturel Espéranto est transféré :

1 place des Avions, 31400 Toulouse

Le téléphone/fax et le courriel sont inchangés :05 61 25 55 77

esperanto.toulouse@free.fr

site: <http://esperanto.toulouse.free.fr>

Week-end à Arrout (09)



La 9/10-an de aprilo, dek kursanoj kunvenis en Arrout (09) por **lerni** aŭ perfektigi sian esperanton.

Ok ekzerciĝis kun Rikardo konversacie, dialoge, rollude pri strangaj kaj nestrangaj temoj, dum du komencantoj malkovris la simplecon de esperanto kaj lernis ĉiutagajn

vortojn kaj frazojn kun Jeannette. Aĝo de partoprenintoj estas de 8 jaroj (jes!) ĝis... (mi ne scias, sed certe la plej aĝa inter ni estis ‘s-ro Ĵojo’, la konata kaj esperantista urbestro de la vilaĝo.


Sabate vespere Evelyne kaj Jean-Pierre montris al ni filmojn faritajn dum la lasta vojaĝo en **Madagaskaro**, kie vivas multaj gastamaj esperantistoj. Dimanĉe posttagmeze

okazis la ĝenerala kunveno de asocio ‘**Une École au Togo**’, fondita por finance subteni la lernejon ‘Zamenhof’ starigita de Koffi Gbeglo en Lomé. Tie, kiel ĉie en Afriko, malriĉeco katenas homojn, kiuj ofte bezonas monhelpojn por emancipiĝi

Kvankam la neĝa kaj malvarma vetero ne helpis, partoprenintoj tamen havis tempon ĝui ekskurseton, ĉu piedpromene, ĉu aŭte.

La akcepto de la Sunkompanio estis kiel ĉiam varma, la kuirarto de Emmanuel estis perfekta, kaj ĉiuj kontentis pri tiu bonetoso.

— Jeannette



Kaj en aliaj regionoj?

Iniciatoj de aliaj esperantistoj estas ofte instigaj; tial ni reproduktas ĉi tiun tradukon de gazetartikolo kiu rakontas pri interesa uzo de Skajpo-programo ('Skype' en la angla) por kontakti eksterlandajn esperantistojn kaj allogi ĵurnalistojn. Dankon al Michel Fontaine, la iniciatinto.

Traduko de gazetartikolo kiu aperis france en *La voix de l'Ain*.

Homo kiu parolas esperanton ĉiutage tra la tuta mondo

Ĉiutage, Michel telefonas aliflanken de la planedo, perrete. De Seulo ĝis São Paulo... ĉiuj alvokoj venas al Saint-Just (Francio) nome de unu

lingvo: esperanto. Tiun lingvon liaj kunparolantoj parolas kaj fulmrapide disvastigas dank'al modernaj komunikadaj teknologioj.

Raportado tra telefonlinio.

Ni ĵus alvenis en la hejmo de Michel. Nia gastiganto nin urĝigas: 'Rapidu, Lee, komercisto pri infanvestaĵoj, ĉeestas el Seulo; li atendas nin; en lia lando estas jam la 22.00, kaj li volas rehejmiĝi por doni manĝaĵon al sia hundo!'

Aliflanke de la telefonlinio, Lee ne atendis nin. Sed ne gravas, Michel rekomencas antaŭan interparoladon kun Franciska, kiu vivas en Aŭstralio. Per kelkaj vortoj, li klarigas al ŝi ke ĵurnalistino en loka skriba gazeto kaj kolego el loka radio ĉeestas. Li parolas al ŝi, sed nek en la angla, nek en la franca. Tio, kio ligas hodiaŭ Michel en Saint-Just kaj Franciska-n el la ekstremo de Aŭstralio, estas Esperanto.

Ili estas miloj kiuj en la tuta mondo interkomunikas per telefono kaj komputilo. Ĉar la aparteco de ĉi tiuj komunikadoj estas ilia senkosteco. Neniu minuto, eĉ sekundo elpezigas. La interparolantoj pagas nur konektiĝon kaj antaŭfiksitan prezon. Tiun magian revolucion oni ŝuldas al programaroj pri komunikado perrete elŝuteblaj kaj ebligantaj ĝin konkretigi. Michel uzas Skajpon, programaron senpage elŝutitan. Ĉar jam estas malfrua horo en la alia flanko de la hemisfero, Franciska malŝaltas, Ĉinio alvokas. Michel ekkomunikas. Temas pri Shi Xueqin, ĉina esperantistino, kiun li renkontis dum la 2004-a UK en Pekino, kaj kiu venas iom babili..

En ŝia ĉina nokto, tiu instruistino pri la ĉina lingvo al 45 geknaboj ok-naŭ-jaraĝaj, eskapas el siaj ĉiutagaj zorgoj dank'al esperanto. Ni demandas al ŝi: 'Kial vi deziris lerni kaj paroli esperanton?' Michel detradukas kaj franclingve transdiras ŝian respondon: 'Mi malsaniĝis. Mi profitis je tio por lerni la internacian lingvon.' 'Hodiaŭ,' ŝi aldonas, 'mi kontaktiĝas kun la tuta

mondo: Brazilo, Francio, Hispanio, Danio, Germanio, Hungario...'

La babilado tre ofte rilatas al ĉiutagaj aferetoj. Kion oni manĝas en ĉiu angulo de la planedo, kion oni faras hodiaŭ pri kio oni zorgas el la landaj aktualaĵoj. Sed, de kontinento al alia, kelkfoje iuj malfacile pridiskutas politikajn temojn. Tion kun ĉinoj Michel forte sentas.

Estas nun pli ol la 15.00 kaj jam 1 275 000 skajp-uzantoj etas konektataj.

Ĉiutagajn kontaktojn Michel prizorgas kun tutmondaj interparolantoj. De la petola brazila virino el Porto Alegre, kiu nomas lin 'karulo', ĝis la diskreta ĉinino el Ŝanhajo..., Michel aprezas la lingvan subtilecon kaj la parolan diplomatecon, kiujn temas mezuri pri iu lando aŭ alia. Ĉimatene, li babilis kun profesoro pri biologio en Koreo.... Kune, ili ĉefe parolis pri la kontrolgardado de studentoj dum ekzamenoj kaj praktikaj studlaboroj. Nenio pli!

De Nebrasko al Hungario..., lia listo de telefonnumeroj paligus vin pro envio. Li povas alvoki Guy en Belgio, Scott en Usono, Joakim en Pollando...kaj tutsimple meti sian aŭdkaskon, paroli en sia mikrofono kaj konversacii kun alia parto de la mondo, samkiel vi alvokas karan amikon!

Interŝanĝoj riĉaj pro renkontoj, pro signifoj kaj pro malkovroj. Tiel dank'al ili ekzemple, Michel malkovris verkojn de Amélie Nothomb en esperanto tradukitajn el la franca: 'Kaj post tio, mi finfine aĉetis ŝiajn librojn en la franca!', li diras ridetante.

Ligitaj per iu humanismo. (daŭrigo de la artikolo en *La Voix de l'Ain*)

Tio kio liaopinie ligas ĉiujn ĉi E-parolantojn, estas iu humanismo. De antaŭ kvar jaroj kiam li eklernis Esperanton, Michel vere ĝuas kiel fiŝo en rivero per tiu centjara lingvo, kaj li konstatas, ke interreto vere helpis ĝin. Neniam tiom da esperantistoj povis paroli sian lingvon per tiom da samtempeco. La rezistantoj kontraŭ la angla kaj tiuj kiuj zorgas plilarĝigi siajn interŝanĝojn, trovas en esperanto veran universalan lingvon.

Tial cetere Flávio Rebello, la brazilano veninta en Bourg-en-Bresse pasintvintre, multon vetas pri projekto de interreta televidkanalo en esperanto. Je kampo de medioj, dudeko da radioj en la mondo elsendas programojn ĉu tute, ĉu parte en esperanto. Ankaŭ Michel emas aŭskulti ilin. Post apenaŭ du sekundoj, li konektas nin al Radio Havano Kubo, kuba esperantista radio ('Libera teritorio en Ameriko', la anoncistino substrekas). Kolorigita de la hispana, de la rusa, de tre bela lingvomiksaĵo, esperanton oni komprenas kelkfoje sufiĉe facile. Legi ĝin ŝajne pli malfacilas, sed tio estas nur iluzio. Ĉar laŭgramatike, ne ekzistas lingvo kun pli simplaj reguloj: nur 16 gramatikaj reguloj. En esperanto, oni tre rapide progresas. Kaj, 'Ekde kiam oni iomete lernis, oni scipovas jam paroli kaj internacie ekkontaktiĝi.'

Dank'al ĉi tiuj komunikadaj medioj, uzado kaj nivelo de esperanto multe kreskas. Tion Michel atestas de kvar jaroj. 'Ĝi estas hodiaŭ,' li diras, 'unu el la plej uzataj lingvoj en la reto...!'

Ĉiuj ĉi personaj kaj regulaj kontaktoj estas trejnigaj. Ili vere helpas al progresoj pri la lingvo. Michel estas vere feliĉa en sia eta oficejo en Saint-Just (apud Bourg-en-Bresse), ĉar: 'Ĉiutage, mi faras mondan rondiron. Dank'al esperanto, reaperis mia malnova pasio al lingvoj kaj vojaĝoj. Vere temas pri pontolingvo. Miamaniere, mi partoprenetas al tutmonda paco.'

— Corinne Garay (*jurnalistino en La voix de l'Ain, (La Voĉo de l'Ain), loka ĉiusemajna gazeto en la franca orienta departemento Ain, inter Liono kaj Ĝenevo*)

Le Point de vue de :

Michèle ABADA-SIMON (*Europe - Démocratie - Espéranto*)

À propos du

Traité établissant une constitution pour l'Europe



La diversité linguistique encouragée, la communication ne pose pas de problèmes à l'Union Européenne – ou elle les cache ? Aucun débat public, en tout cas : sujet TABOU.

Qu'en dit la « Constitution »?

Une douzaine de lignes. Satisfaisantes, au moins ?
Voyez vous-mêmes.

Préambule

Partie II. « La Charte des DROITS fondamentaux de l'Union ».

Titre III. ÉGALITÉ

ARTICLE II-81. NON-DISCRIMINATION

*/*Est interdite toute discrimination fondée sur [...], la langue [...].

/*Bien ! On va donc cesser de privilégier les anglophones ?

ARTICLE II-82. DIVERSITÉ CULTURELLE, RELIGIEUSE et LINGUISTIQUE

*/*L'Union respecte la diversité [...] linguistique.

/*Comme vous voyez, la LOI est parfaite – en théorie – ... qui n'engage à rien. J'exagère ? J'aimerais, outre le « respect », une réelle protection de la diversité.

Méfiance gratuite ? Poursuivez vos recherches.

Partie III. « Les politiques et le FONCTIONNEMENT de l'Union »

Titre I. Dispositions d'application générale

ARTICLE III-118

*/*Dans la définition et la mise en œuvre des politiques et actions [...] l'Union cherche à combattre toute discrimination fondée sur

/*Bingo ! Si elle « cherche » (hum!) ... elle trouvera peut-être ? Vous êtes optimiste, c'est bien. Mais... eh ! cherchez bien vous-mêmes : tout au contraire, le mot « langue » a disparu de l'énumération. Cela signifie : il n'est pas question de mettre fin à la discrimination linguistique et à l'hégémonie de l'anglais.

C'est tout à fait clair. Après le leurre du mot */toute !

/*(De même, sur tout autre sujet, soyez attentifs à « lire » tout ce que la « Constitution » se garde bien de dire.)

Titre II. NON DISCRIMINATION ET CITOYENNETÉ

ARTICLE III-124-1

*/*Sans préjudice des autres dispositions [...] et dans les limites des compétences....

/*Que de réserves et de précautions ! Inutile de s'en inquiéter puisque ici encore, la question des langues a été éliminée de la liste des mesures nécessaires qu'une loi-cadre du Conseil*/ ... peut établir_ les mesures nécessaires pour combattre toute discrimination [...]

/*Sauf celle fondée sur la langue ! Et le Conseil n'en a aucune obligation.

L'avenir légal du tout-anglais est ainsi assuré.

ARTICLE III-128. On se réjouit d'y apprendre que :

*/*Tout citoyen de l'Union a le DROIT de s'adresser aux institutions ou organes consultatifs [...] et de recevoir une réponse

/*dans les langues officielles des États-Membres. Hélas ! Je n'ai trouvé nulle part que les institutions aient le DEVOIR de répondre dans la même langue. Mais, le dernier paragraphe de l'ARTICLE I-10 stipule : */Ces droits s'exercent [...] dans les limites définies [...] par les mesures adoptées en application de celle-ci.

/*C'est-à-dire, à l'ARTICLE III-118 cité plus haut : bravo ! joli tour de passe-passe !/(De même

que par ailleurs le « droit au travail » est remplacé par le droit de chercher un travail et de travailler.)

Si vous avez encore des doutes ou des illusions sur l'honnêteté et les intentions réelles de cette « Constitution » à l'égard des langues, procurez-vous le PROJET : il y figurait, p. 270, une page entière intitulée LANGUES, vide aux 4/5èmes, ne contenant que la liste des 21 langues officielles des États-Membres – avec un minuscule renvoi (pour le remarquer il faut d'excellents yeux attentifs ou une loupe – comme pour les clauses des contrats retors, les conditions des publicités mensongères, ou la traduction des annonces en anglais) : la note en bas de page est aussi invisible que possible et annonce que

*/*cet article devra être ADAPTÉ conformément à l'Acte d'adhésion.

/*Cela a disparu dans la « Constitution ».

CONCLUSION ?

Après avoir affirmé d'excellents *droits* (ne pas jeter le préambule à la poubelle !), on a tout aussitôt *censuré le mot même de langue*. Cette « Constitution » s'occupe en détail des banques (176 fois le mot y revient), marché (88) concurrence (29) commerce (38), capitaux (23), etc. Mais elle ne s'occupe pas d'une solution démocratique (et économique !) pour la communication internationale. Bien sûr, on ne prend pas le risque d'avouer le tout-anglais obligatoire.

C'est pourquoi je voterai NON (et pour bien d'autres raisons encore, aussi précises).

La perfection est, certes, inaccessible, et les opinions divergent. Mais il est du moins possible de REFUSER l'inacceptable, même bien masqué, et de rendre ainsi non seulement possible mais indispensable l'amélioration de cette « Constitution »

Quant à rêver sérieusement qu'on examine enfin l'intérêt d'une langue commune européenne, facile et neutre (l'ESPÉRANTO, sans l'ombre d'un concurrent), c'est Claude PIRON qui a parfaitement ainsi conclu le débat à la suite de sa conférence à Boulogne/Mer : *Ne pas attendre des autorités la justice linguistique*. La chercher plutôt avec les altermondialistes dans les Forums Sociaux (et justement, pour quantité d'autres excellentes raisons, ATTAC vote NON – mais les médias ne lui laissent presque aucune place). Aux citoyens d'imposer.

— Michèle ABADA-SIMON

C'est (presque) l'été :

Des cours et des stages pour se perfectionner

Cercle Biterrois d'Espéranto : 18 – 25 majo Batipaume (AGDE - 34)

Dum la tuta semajno okazos 3 aŭ 4 diversnivelaĵoj kursoj. Oni kursas 5 h /tage; postagmeze libera.

Vesperojn oni dediĉas al distriĝo: prelegoj, skeĉoj, filmoj, ludoj... kun partopreno de la kursanoj.

Dulitaj komfortaj ĉambroj kaj abundaj manĝoj. *Ebleco tendumi.*

Aliĝo al kurso : 55 € ĝis la 27/04, 70 € poste

Restado: semajno-pensio : 308 € (368 € en unulita ĉambro)

Christian HERBETTE, 22 ZA Le Bousquet, 34310 MONTADY,

tel : 04 67 21 86 61 chrizo@worldonline.fr

Kulturdomo de esperanto/ Maison culturelle de l'espéranto

Des cours, des conférences et des excursions tout l'été, du 2 juillet au 20 août.

Chaque stage commence samedi à 19.00. (cours le dimanche matin) et se termine vendredi soir ou samedi matin.

3 niveaux de cours, une bibliothèque, des jeux (ping pong, volley-ball... dans un très beau parc de 17 ha.

Hébergement dans le château en chambres de 1 à 6 lits, repas copieux. *Possibilité de camper.*



Tarif : adhésion au cours : 37€/semaine

Pension complète : 30,30 €/jour en chambre à deux. (+ 4,30€ en chambre individuelle).

Inter aliaj kursoj :

De la 2-a ĝis 16-a de julio: trejnado al tradukado kaj interpretado kun F.SIMONNET (3a grado)

Kompleta programo ĉe : Château de Grésillon, 49150 BAUGE, 02 41 89 10 34
kastelo@gresillon.org <http://gresillon.org>

Internacia Semajno de la

Kulturo kaj Turismo – 1 – 8 okt. - Callela (Katalunio) (80 km norde de Barcelono)

La 13-an fojon jam Luis Serrano Pérez organizas tiun interesan semajnon.

Minimume kvar ekskursoj, diversaj prelegoj, « Alitipa legado de Don Kihoto », « De la akvo al tero, evoluo de vegetaĵoj » Stano Marček prelegos pri « 100 jaroj de la revuo Esperanto ». La vesperoj estos ankaŭ malfermaj al talentoj de la partoprenantoj. Ankaŭ esperanto-kursoj okazos !

Tarifo :Loĝado en tri-stela hotelo : kompleta pensio : 30 €/tage en dulita ĉambro (40 € en unulita)**Aliĝkotizo** : 20 € ĝis la 31-a de julio , 25 € post tiu dato.

Info :Luis Serrano Pérez, Apartad 423, ES-08200 Sabadell, Hispanio. Tel: +34-937275021

<luis_serrano.ĉe.mixmail.com>

14-a Koruso Staĝo en esperanto - 29 okt. - 5 nov.

Montferrier (Ariège, Francio)

Polifonia kanto internacia, gvide de Kataluna korusestro Carles VELA i AULESA, helpita de dana korusestro Jesper JAKOBSEN.

Trejnado 5 h./ tage.

(Eblas esperanto-kurso por komencantoj).

Tarifo : Aliĝo : (ĝis 25 majo) 36 € + 16€

(ĝis 25 aŭg.) 48 € + 16€

Plena pensio 7 taga : 210 €

Aliĝo : Georges COMTE, 11420 Lafage

T. 04 68 60 54 17 jorgos@tiscali.fr

Projekto de justa turismo :

Vojaĝo al Gvatemalo

En la lastaj jaroj esperanto eniris en la indiĝenmondon (programo *Indiĝenaj dialogoj*). Unu el la eblaj kunlaborkampo por indiĝenoj estas ekoturismo, kiun ili povas realproprigi por perlabori sian vivon, anstataŭ lasi aliajn profiti. El la vidpunkto de la turisto, la sperto de pli aŭtenta kontakto aldoniĝas al la sento kontribui al socia justeco.

Gvatemalo estas centramerika lando, en kiu koncentriĝas multaj elementoj de sukcesa

turismado (arkeologiaj lokoj « *maja* », humida praarbaro, pacifika kaj atlantikaj marbordoj, kaj la « malvarmaj teroj », kun lagaj kaj vulkanaj eksterordinaraj pejzaĝoj.

Estas planata trisemajna vojaĝo en jan-feb 2006 en tiu *maja*-lando. Nombro limigita je 15 turistoj.

Antaŭvidita kosto : proksimume 2000 € (povas vari laŭ aviadkostoj kaj kurzoj.)


...kaj por la junuloj :

Internacia Junulara Semajno

Vác, Hungario

proksime al Budapeŝto

8a kaj 14a de aŭgusto, 2005



Tio estas *la semajno* de sendorma refreŝiĝo, novaj frenezaĵoj, solena balo kun viva muziko, belaj vestaĵoj kaj bala vespermanĝo, ekskursoj al Budapeŝto kaj al pitoreskaj lokoj apud la Danubo. Ĉio ĉi okazos en neforgesebla esperanta etoso...

La temo? Vojaĝo!

Prezo (inkl tranoktojn en 4-lita ĉambro kaj ĉiujn manĝojn) : **de 118 ĝis 183 €** laŭ aĝo kaj aliĝdato.

Informo : <http://www.ijs.hu/> <ijs@ijs.hu>

61-a IJK en Pollando

31.jul – 7 Aŭg.2005 Zakopane

Aliĝis jam **346** personoj !

La temo de IJK "Unueco en diverseco" koncernas egalrajtecon, tial ni proponas interalie lingvan festivalon por prezenti riĉon de eŭropaj (kaj ne nur) lingvoj.

Proksime de Zakopane troviĝas Krakovo, iama ĉefurbo de Pollando, rezidejo de polaj reĝoj kun mezepoka kaj renesanca arkitekturo.

Ni planas organizi ĉiutagajn ekskursojn al montaro, instruadon de polaj popoldancoj, ...

Aliĝkotizo : 40 ĝis 80 € laŭ aĝo

Tranokto en junulargastejo (7 noktoj) : 35€

Ĉiuj manĝoj (7 tagoj) : 35 €

<http://www.tejo.org/ijk/2005/cxefa.php>